

Romanoj kaj filmoj en la Hispana Enlanda Milito

Ekzistas KD, kiu kompilas pli ol 40 000 verkojn pri tiu milito. Kostas 690 €. Kompreneble plejparto de ili estas historiaj libroj, pri diversaj temoj kaj vidpunktoj, sed multaj el ili estas ja literaturaj verkoj, eble milo da ili. Nun oni mencias nur kelkajn elektitajn inter la plej popularaj kaj kuriozaj. Plej multaj el ili estis adaptitaj al kino.

En 1941 premieris la filmo “Raza” (“Raso”) pri la historio de tri gefratoj, ĉiuj en la frankisma tendaro, dum la milito. Plej interesa kuriozaĵo estas, ke la scenaro estis bazita sur romano ŝajne verkita de Francisco Franco mem. En 1950 oni faris novan version kun ŝanĝoj en aludoj al Usono kaj forigoj pri Falango, kio montras la forton de cenzuro en la epoko kaj la novan sintenon de la frankisma estraro, nun apartigita de la venkita Akso kaj celante aliron al la usona venkinto.

Dum kompreneble la frankismaj versioj de la milito ricevis favorajn oportunojn, tiuj de la mala tendaro (inklude tiujn, kiuj intencis objektivcon) estis tute malpermesitaj kaj povis esti publikigitaj nur en ekzilo. Ekzemple “Réquiem por un campesino español” de Ramón J. Sender (“Rekviemo por hispana

kampanaro”, 1953), kiu aperis lastatempe brile tradukita en Esperanton fare de Antonio Valén. Tiu novelo montris la kunkulpon de ekleziuloj rilate al la amasmurdo de senkulpuloj. En ĝi, pastro memoras la historion de sia amiko Pako, murdita de falangistoj, danke al sia malkaŝo de lia kaŝejo.

Alia romano (fakte serio de naŭ romanoj) de la sama verkisto estas “Crónica del alba” (“Kroniko de la mateniĝo”), fakte nur titolo de la unua novelo), same publikigita nur en ekzilo ekde la 1940-aj jaroj kaj en la frankisma Hispanio nur en 1971, akceptita nur, ĉar ĝi enhavis fortan kontraŭkomunisman kritikon. Tiam la publikigo de tiklaj verkoj devis ĉiuokaze iel trompi la cenzuron. En tiu unua eldono de la romanaro en tri volumoj la eldonisto iel malobeis la malpermeson montri la respublikan flagon per la fono de la tri kovrilpaĝoj, kiuj kune ja montris la malpermesitan flagon.

Kun Sender, aliaj verkistoj, kiel Arturo Barea kaj Max Aub, dediĉis gravajn verkojn al membiografia rakontado de tio, kio kondukis al la milito: nome malfacilaj infanaĝo kaj juneco, militservo en kolonia milito en Maroko, socipolitikaj luktoj dum kaj kontraŭ la diktaturo de Primo de Rivera kaj dum la respubliko, milito, malvenko kaj ekzilo. Ili estis nomitaj Generacio de la Ekzilo, kaj iliaj verkoj estis publikigitaj nur je la vera finfino de la frankisma diktaturo.

Sama neceso rakonti kaj pravigi la sintenojn de la respublika tendaro rezultis en la verkoj de nehispanaj alvenintoj favoraj al la maldekstra kontraŭfaŝisma flanko. Inter tiuj, en 2024 SATeH eldonis en Esperanto du verkojn de respektive nederlanda kaj norvega verkistoj, kiuj rakontis tion, kion ili vidis dum la milito en Hispanio, sub la titolo “Volontuloj kun


okulvitroj”, nome “La hispana tragedio” de Jef Last kaj “Hispana somero” de Nordahl Grieg. Ili estis iam publikigitaj eksterlande propagandcele, sed nek en Hispanio nek en la hispana.

Aparta kazo estis la franca verkisto Georges Bernanos, kiu venis en Hispanion kiel katoliko



favore al la frankisma tendaro, sed kiu vidinte la troan kruelan subpremado fare de frankistoj, verkis en 1938 protestan verkon “La grandaj sublunaj tombejoj” (“Les grands cimetières sous la lune”), kiu estis malpermesita en frankisma Hispanio kaj publikigita nur en la 1980-aj jaroj.

Alia tre konata kazo estas la brito George Orwell, kiu venis kadre de la komunisma kampanjo de la Internaciaj Brigadoj, sed aliĝis al la nestalinisma komunisma milico de la partio POUM. Lia verko “Homage to Catalonia” (“Omaĝo al Katalunio”, samjare, 1938) estas unuflanke grava montrado de la sociala kolektiveco de la dum milita revolucio kaj aliflanke de la stalinisma subpremado ene de la respublika tendaro kontraŭ aliaj sektoroj de la sama flanko. Tio inspiris filmon de Ken Loach en 1995, kion poste oni mencias.



Tra la mondo: Eŭropo

La porrespublika propagando ekster Hispanio atingis ankaŭ usonajn mediojn. Famis la romano de Ernest Hemingway “Por kiu la sonorilo sonoras” (“For whom the bell tolls”, 1940), kiu estis adaptita en filmon en 1943, kun ĉefroluloj luditaj de Gregory Peck kaj Ingrid Bergman, ne malpermesita en la frankisma epoko, sed kompreneble post interveno de la cenzuro, kiu modifis dialogojn, unue en la versio de 1940 (ankoraŭ favore al Akso) kaj poste en la versio de 1943, kun dialogo pli favora al usonanoj.

Reveninte en Hispanion, en la 1970-aj jaroj ekaperis verkoj, kiuj jam ne estis tiom subpremitaj de la diktatura cenzuro, kiu bezonis ŝajnigi sin pli malferma por atingi akcepton en internaciaj organismoj kaj ekonomioj. Nur unu jaron post la morto de Franco, ricevis la Premion Planeta, unu el la plej prestiĝaj literaturaj premioj, la verko “En el día de hoy” (“Hodiaŭ”) de Jesús Torbado, nome unuaj vortoj de la lasta militinformo subskribita de Franco mem, per kiu li anoncis la finon de la milito kaj finan venkon super la respublika armeo en la 1-a de aprilo 1939. Sed la verko estas ukronio, kiu supozigas, ke en la milito venkis la respublika tendaro kaj ne la frankisma tendaro. Tiukadre nun estas socialistoj Julián Besteiro prezidento de la respubliko kaj Indalecio Prieto ĉefministro. Ĉefrolulo de la verko estas Ernest Hemingway, ĵurnalisto en la respublika Madrido.

Samjare aperis filmo “Las largas vacaciones del 36” (“La longa feritempo de la 36-a”), kiu fokusas, kiel kutima trajto de la tiamaj verkoj, al la ĉiutaga vivo dum la milito, anstataŭ pri la batalaj aŭ perfortaj okazaĵoj. Barcelonaj familioj translokiĝas kiel kutime al kamparaj somerlokoj por traviviti, kio dekomence estas supozata mallonga milito, sed kiu poste iĝas trijara. Tiel la somerferioj de la geknaboj ŝanĝiĝas de dumonataj al trijaraj. La vidpunkto de junuloj


estos plua motivo de literaturaj kaj kinaj verkoj pri la milito.

Sekvajare en 1977 publikiĝis la teatraĵo “Las bicicletas son para el verano” (“Bicikloj utilas somere”) de la fama aktoro kaj verkisto Fernando Fernán Gómez. Denove oni fokusas al ĉiutaga familia vivo de junulo, kiu plendas, ke li ne ricevis kiel premion biciklon promesitan (pro atingitaj malbonaj lernorezultoj), kaj la patro prokrastas tion por la fino de la milito; la junulo plendas, ke “bicikloj utilas somere”. Nun oni emfazas pri malsato, kiu malbonigis la vivon en ambaŭ tendaroj, kiel okazas en ĉiu milito. Sep jarojn poste, la teatraĵo estis adaptita al samnoma filmo, kun ĉefroluloj luditaj de popularaj aktoroj Gabino Diego kaj Agustín González.

En 1985 famis filmo “La vaquilla” (“La bovineto”) kiu estas ekzemplo de du novaj elementoj en la militrakontaro. Unuflanke la humuro: la intrigo konsistas je roto de respublikaj soldatoj, kiuj enfiltriĝas en frankisma areo por ŝteli bovineton kaj tiel ruinigi la lokan festan taŭrludadon kaj krome kontentigi sian malsaton. Kompreneble okazas sennombraj ridindaj epizodoj. Alia elemento, kongrua kun la tendenco apartiĝi disde la militbatalaj okazoj, konsistas el profito de anekdotoj pri ia kunvivado trans la tendarajn diferencojn.

Tiukadre, pri la fojaj konfuzoj pro la fronta limo inter la du tendaroj, la intrigo de la teatraĵo “Ay, Carmela” (sekvajare, 1986) prezentas du geaktorojn, kiuj ludis en respublika areo, sed hazarde kaj malvolonte troviĝas en frankisma zono. Ili devas ludi antaŭ miksitaj publiko de italaj frankistoj kaj prizonuloj de la Internaciaj Brigadoj. La teatraĵo famiĝis, kaj kvar jarojn poste iĝis filmo kun ĉefroluloj luditaj de popularaj Andrés Pajares kaj Carmen Maura. 28 jarojn poste (nu, antaŭ 8 jaroj) la verko aperis en Esperanto kiel “Ha, Karmela!” en traduko de Miguel

Fernández. La titolo aludas al populara hispana kanto, kiu estis kantita dum la milito fare de ambaŭ tendaroj kun kompreneble malsimila vortumado.



Ankaŭ en 1986 la filmo “La guerra de los locos” (“La milito de la frenezuloj”) montras tute nekutiman etoson por la milito. En la komenco de la milito, kelkaj frenezuloj de frenezulejo profitas la konfuzon okazigitan de la alproksimiĝo de la frankismaj trupoj por fuĝi el la centrejo, kiun ili jam estis regintaj profitante de la fuĝo de la direktoro, kiu estis deleginta siajn respondecojn al monaĥinoj. En la fuĝo, la frenezuloj renkontiĝas kun grupo de anarkiistoj, kun kiuj ili eniras en la frenezecon de la milito.

En 1995 aperis la filmo “Land and freedom” (“Tero kaj libero”) de la brito Ken Loach, kiu enhavas du jam menciitajn temojn ligitajn al la ĝenerala kompreno de la milito. Unuflanke la socialaj aferoj, kiel la kolektivigo kaj partopreno de la virinoj en la respublika flanko. Aliflanke oni prezentas la subpremadon fare de stalinismaj komunistoj kontraŭ nestalinismaj komunistoj kaj liberecanoj ĝenerale, kio kondukis preskaŭ al interna milito ene de la respublika zono kaj la finigo de la sociala progreso en ĝi. Tiu seniluziigo devenas de la inspiro el la jam menciita verko de George Orwell “Homage to Catalonia”.

Tra la mondo: Eŭropo

Oni menciis du verkojn pri la temo de la virinoj en la milito. En 1996 aperis filmo “Libertarias” (“Liberecaninoj”), kiu montris la gravan partoprenon de virinoj, ĉefe en la anarkiismaj sektoroj, ne nur en militaj aferoj, sed ankaŭ en socialaj temoj (ekzemple por eligi putinojn el la sklaveco de bordeloj). Finfine ili suferis pro la subpremado milita, sed ankaŭ pro la miskompreno de siaj samflankaj kamaradoj. En 2002 publikiĝis la romano “La voz dormida” (“La dormanta voĉo”) de Dulce Chacón. En ĝi la virinoj tuj post la milito suferas subpremadon pro sia helpo al la viraj aktivuloj kaj en prizono kaj ekster ĝi. La romano iĝis samnoma filmo naŭ jarojn

valoro, kaŝas ĝin por redoni ĝin nedamaĝitan al aŭtoritatoj. Post multaj epizodoj en la militfino li devas redoni ĝin al la frankismaj novaj aŭtoritatoj kaj samtempe okazas emocia sceno rilata al la pentraĵo pri la mortpafado.



En la sekva jaro (1999) la filmo “La lengua de las mariposas” (“La papililango”) montras la rolon de afabla instruisto (jam menciita Fernando Fernán Gómez), kiu alvenas en vilaĝon kun modernaj instrumentoj kaj kiel ĝuste pro tio je la alveno de la frankismaj trupoj, li suferas humiligan publikan elpostenigon, torturon kaj ekzekuton. Plian teruron aldonas la fakto, ke ĉio estas vidita el la perspektivo de knaba lernanto, nu de infano, kiu apenaŭ povas kompreni la gravecon de la afero.

Simila temo, sed bazita en reala okazaĵo, estas la kerno de la filmo “El maestro que prometió el mar” (“La instruisto, kiu promesis la maron”, 2023), same instruisto, kiu alvenas en kastilian vilaĝon kun laikeco kaj modernaj instrumentoj (Freinet), kio tuj estigas la malamon de la loka pastro. La lernantoj estas entuziasmaj, ĉar ili presas siajn proprajn kalendarojn kaj la instruisto promesas al ili ekskurson, por ke ili vidu por la unua fojo la maron; sed julie okazas la puĉo kaj ne nur la ekskurso ne okazas, sed krome la puĉistoj mortpafas la instruiston.

Tiu filmo enkondukas alian temon, kia estas la rekupero de la historia memoro, tio estas la klopodoj por reverki la militrakonton, honorigi la subpremitojn de la faŝisma agado kaj milita kaj ĉefe postmilita kaj honorigi iliajn restaĵojn. Tiukadre la filmo alternigas scenojn de la antaŭmilita kaj milita okazaĵo kun scenoj de la 21-a jarcento, kiam juna esploristino esploras la aferon en la vilaĝo kaj trovas maljunulon, kiu tiam estis unu el la lernantoj. Nun la filmo disponeblas kun esperantaj subtekstoj. La disvastigo de la filmo kaj de ties reala okazo popularigis la epizodon kaj rezultigis diversajn projektojn, kiel la kreadon de iniciato en la kastilia devenloko kaj ties bazlernejo, jam ne funkcia pro manko de infanoj, inter aliaj. Du SAT-kongresanoj, Sol kaj Pako kunlaboris kun projekto Misio Benaiges (laŭ la nomo de la reala instruisto), kiu sukcesis arigi lernantojn de malfavorataj sektoroj, veturigi ilin al la vilaĝo, kaj poste al la maro, tiel plenumante la promeson, kiun antaŭ 90 jaroj ne eblis plenumi.

Simila strukturo (alternu inter milita pasinto kaj nuntempa rekupero de la historia memoro) kuŝas en la romano “Soldados de Salamina” (“Soldatoj de Salamino”, 2001) de la verkisto Javier Cercas. La intrigo eliras same el reala okazaĵo en la lastaj tagoj de la milito, kiam respublikaj trupoj kondukis ekzekutotajn frankismajn malliberigitajn tra arbaraj areoj de norda Katalunio. En unu momento kelkaj frankistoj fuĝas kaj la soldatoj persekutas kaj pafas ilin en la densa arbaro. Iu milicano trovas Rafael Sánchez Mazas, sed ne pafas, rigardas kaj permesas lin eskapi. Sesdek jarojn poste esploristino serĉas inter francaj ekzilianoj tiun soldaton, kiel montri de la rekuperado de la historia memoro. En 2003 la romano iĝis filmo, kiu male al ofta kutimo, estas multe pli bonkvalita ol la inspira teksto. Siaflanke, Rafael Sánchez Mazas iĝis gravulo de la maltolerema frankisma reĝimo kaj



poste.

En 1998 publikiĝis la filmo “La hora de los valientes” (“La horo de la kuraĝuloj”), kies intrigo eliras el reala historia okazo de transporto de artaĵoj el Muzeo Prado por eviti damaĝon pro bombardado, kun fikcia intrigo de juna ĉiĉerono de la muzeo (Gabino Diego), kiu emocie klarigas al vizitantoj pri la fama pentraĵo “La mortpafado de la 3a de majo” de Goya, ĉar ankaŭ tiam eksterlandaj trupoj masakras hispanojn milite. Dum la transportado de la pentraĵoj restas forgesita en angulo eta memportreto de Goya kaj Gabino, konscia pri ties

Tra la mondo: Eŭropo

de la Falango kaj ne aprezis la agon de tiu, kiu savis lian vivon.

En 2004 oni publikigis novelaron “Los girasoles ciegos” de Alberto Méndez. Temas pri kvar epizodoj de la milito, sed tute for de la batalaj cirkonstancoj kaj anstataŭe enkadrigitaj en la kunteksto de subpremado kaj de tre personaj situacioj. La kvara samnoma novelo estis adaptita al filmo “Los girasoles ciegos” de José Luis Cuerda. Kaj la novelo kaj la filmo frontas la temon de la tiel nomitaj “talpoj”, tio estas rifuĝintoj, kiuj anstataŭ fuĝi al ekzilo restis hejme en malgranda kaŝejo dum jardekoj. Tiukaze la kaŝito kunvivas kun edzino kaj gefiloj, kiuj disvastigis al la ceteraj lokanoj, ke la edzo kaj patro foriris dum la milito kaj ili scias nenion pri li, plej probable mortinta. La situacio komplikiĝas, kiam nedeca pastro persekutas kaj allogas la belan supozeble “vidvinon”, kaj la edzo devas eliri el sia truo por fronti lin.



En 2006 kurioza hispan-meksika filmo ricevis multnombrajn premiojn kaj honorojn (inter kiuj kelkaj Oskar-oj), nome “El laberinto del fauno” (“La labirinto de la faŭno”) de Guillermo del Toro. La filmo miksas la kruelaĵojn de la subpremado fare de kapitano al lokanoj kaj ĉefe al la

kontraŭfrankismaj gerilanoj tuj post la milito kun la rigardo per magia realismo fare de infanino, kiu kondukas la rakonton al fantastaj scenoj. Kuriozaĵo de la filmo estas, ke unu el la produktoraj kompanioj nomiĝas Esperanto-Filmoj, tiel! Ŝajne la produktoro elektis tiun nomon, ĉar kino estas internacia lingvo!

Alia tre aparta filmo aperis en 2010, nome “Balada triste de trompeta” (“Trista trumpetbalado”, de Álex de la Iglesia) pri klaŭno, kiu partoprenis en la defendo de Madrido atakita de frankismaj insurekciuloj kaj estis malliberigita en koncentrejo cele al la konstruado de la Valo de la Falintoj, kie li mortis; dum la frankisma epoko, lia filo, same klaŭno, klopodas revenĝon kontraŭ frankisma gravulo kaj kontraŭ perfortema estro de sia cirka etoso, kio finiĝas per akra batalado en la jam konstruita frankisma monumento Valo de la Falintoj.

En 2013 la filmo “La mula” (“La mulino”) denove pritraktas personan epizodon iom apartigite de la militoperacoj, bazita sur samnoma romano de Juan Eslava Galán (2003). Juna soldato trovas hazarde mulinon solecan en frontolinio kaj alproprigas ĝin por postmilito solvi sian personan laborsituacion.

En 2019 aperis filmo “Mientras dure la guerra” (“Dum pluas la milito”, alude al la ŝtatestreco de Franco, kiu ne plenumis tion kaj instalas personan diktaturon dum 40 jaroj). En tiu filmo oni sekvas la ideologian konflikton de la fama verkisto kaj profesoro Miguel de Unamuno, kiu dekomence apogis la insurekciulojn, naive kredante, ke ili restarigos la ordon en la respubliko, sed poste konstatis, ke oni arestis kaj ekzekutis liajn amikojn kaj li mem suferis publikan atakon dum ceremonio de falangistoj antaŭ Franco mem, reala epizodo, kiu estis registrita de multaj atestantoj.

Samjare aperis la filmo “La trinchera infinita” (“La senfina tranĉeo”, 2019), denove pri la temo

de tiel nomitaj “talpoj”. La filmo sekvis inspiron en reala kazo de urbestro de onuba vilaĝo, kiu restis en hejma kaŝejo dum tridek jaroj, tiel sekvante la tendencon filmigi realajn okazintaĵojn. En la filmo la ĉefrolulo frontas ne nur sian propran kondiĉon de malliberulo en propra hejmo, sed ankaŭ la premon de la propraj familianoj malkapablaj elteni tiun situacion post tiom da jaroj. Kiam finfine la talpo eliras surstraten, li gapas, ke neniuj lokano rekonas lin kaj ke neniuj persekutas lin, falintan en forgeson.

En 2024 publikigis du verkoj, kiuj estis ege sukcesaj. David Uclés publikigis “La península de las casas vacías” (“La duoninsulo de la malplenaj domoj”), kiu rakontas la tutan enlandan militon kun intencitaj tonoj de magia realismo kaj imitemo al “Cent jaroj de soleco” de Gabriel García Márquez. Ne nur la verko iĝis ege sukcesa, sed ankaŭ la verkisto iĝis amaskomunikila figuro.

Siaflanke, Paco Cerdà publikigis “Presentes”, kiu rakontas historian epizodon okazintan en 1939, en kiu falangistoj solene procesiis portante la kadavron de José Antonio Primo de Rivera, fondinto de la faŝisma partio kaj ekzekutita dum la milito, el Alikanto ĝis Madrido kaj El Escorial, kie li estos denove solene entombigita kun la hispanaj reĝoj. Poste li estos translokitita al Valo de la Falintoj, tiam ankoraŭ konstruota. Tiu rakonto kombiniĝas en la romano kun epizodoj pri la sekvoj de la milito en diversaj roluloj, ĉu konataj ĉu pli anonimaj de ambaŭ tendaroj. Fakte, la diversaj agadoj rilate al la Valo de la Falintoj, nun renomita Valo de Cuelgamuros, estas unu el la plej polemikaj aferoj inter defendantoj de la rekupero de la historia memoro (reformo de la monumento) kaj frankismaj nunaj kontraŭantoj.

Kani

(ampleksigita el prelego dum la 99-a SAT-kongreso)